



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 2
1969

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-periodo
35-a (40-a) jaro
Monata

La fromaĝo de Hans Jakobsen

Lau Henrik Wergeland

Inter niaj laboristoj tiuj, kiuj plenumas la plej pezan ŝtonlaboron, ŝajne estas plej malriĉaj. Ili etsas taglaboristoj, kaj plej ofte, bedaŭrinde, ili estas tiaj, kiuj dum la somero ne pensas pri la vintro.

Tiam ili suĉas la piedon kiel la urso, sed tio ne grasigas ilin. Sed inter tiuj mi iun ŝagon en tiu ĉi aŭtuno renkontis viron, kiu meze en sia malriĉo ŝajnis havi klaran koncepton kaj ĝojan konscion pri kio tamen valoras la liberoeco. Li laboris sur konstruaĵo, kie ankaŭ laboris kelkaj malliberigituloj, kiuj alportis ŝtonojn al la fundamento. La malliberigituloj ĵus revenis al la laboro post la tagmeza paŭzo, kiu komencas je la 11.a, kiam masonisto Hans Jakobsen sidigis sub ŝirmilo por manĝi sian tagmanĝon. Ĝi estis sufiĉe simpla. Li sidis tie sola kun sia haringo kaj sia pano, sed mi vidis iujn manĝi rostitaĵon kaj pudingon kun pli malgaja mieno. La haringo jam estis man-

ĝita, kaj nun Hans mordis la panon.

«Modesta tagmanĝo hodiaŭ, Hans!» mi diris.

«Nu, mi havas bongustan fromaĝon sur mia pano,» Hans diris, ridetante.

«Kie ĝi estas? Mi vidas nek buteron nek fromaĝon sur ĝi, nur la neĝflokojn, kiuj falas.»

«Jes,» diris Hans kaj fingromontris al la sklavoj, «mi havas bongustan fromaĝon: *Mi havas liberecon.*»

Ho, Hans Jakobsen! Viaj ĉifonoj iĝis oraj franĝoj je tiuj vortoj, la kalkaj makuloj sur via surtuto arĝento kaj perlamoto.

Nedeca similigo! Neniu oro povas beligi la nudan altecon de tiuj vortoj. Ĉio iĝas falsaĵo.

«Tiu fromaĝo sur via pano, Hans, estas bona norvega, nenova fromaĝo!»

(Daŭr p. 27)

Sciigoj de N. E. L.

La norveglingva eldono de «Vivo de Zamenhof». Ni memorigas pri tio ke N.E.L. transprenis la reststokon de tiu grava, valora kaj interesa libro tre malmultekoste, tiel ke ni povas vendi ĝin por nur po kr. 3,00. La stoko tamen ligas grandan parton de nia modesta kapitalo, kaj aliflanke la libroj faros utilon nur kiam ili estos disvenditaj! Tial ni admonas la membrojn amase aĉeti de ni la libron, kiu estos taŭga donaco al viaj amikoj kaj konatoj. La kluboj povas kolekti mendojn de la membroj kaj sendi kune por ŝpari afrankon.

Taskotabelo por la kluboj. — *Marto:* Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasisto sendas poŝtan enkasigilon al la membroj, kiuj ankoraŭ ne pagis la kotizon.

La Liga Estraro.

Informoj de la Ekzamena Komisiono

Ordinaraj printempaj ekzamenoj. Ekzamenoj okazos ĉirkaŭ la 1-a de Junio 1969. Instruistanoj ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg,

Sauda, Tromsø kaj Trondhejmo. Oni anoncu sin per la presitaj skemoj riceveblaj de la ekzamena komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, *antaŭ la 1-a de Majo*. Personoj, kiuj faros la ekzamenon ne en Oslo, plenigu po 2 — du — skemojn. *Plenigu la skemojn precize kaj komplete!* — *Aliĝoj, kiuj alvenos post la 1-a de Majo, ne estos konsiderataj.*

Ekzamenoj dum la Landa Kongreso. La Landa Kongreso okazos en Budor, Løten 21.—22. Junio. Kandidatoj, kiuj deziras fari elementan aŭ superan ekzamenon dum la Landa Kongreso, anoncu sin per la presita skemo (vidu supre), rekte al la Ekzamena Komisiono antaŭ la 20a de Majo.

NB! Nur personoj loĝantaj en lokoj, kie ne troviĝas loka ekzamena komitato, povos fari ekzamenon dum la Landa Kongreso.

Adresoj de la lokaj ekzamenaj komitatoj:

OSLO: Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo 1. Poŝtĝirokonto 100.34.

BERGEN: S.ro Kjell Offerdal, Sv. Hjetlands vei 6 B, 5031 *Laksevåg*.

HAUGESUND: S.ro Olav Thormodsen, Boks 59, 5501 *Haugesund*.

SARPSBORG: S.ro Johan Hammond Rosbach, Hulderavn. 17 B, 1700 *Sarpsborg*.

SAUDA: S.ino Elna Matland, Brekkevn. 50, 4200 *Sauda*.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach, Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20 en la monato antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—, 1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—, 1/8 p. kr. 19,—.

TROMSØ: S.ro Arne Høgseth, Høgstua, Postboks 1025, 9021 *Tromsdalen*.

TRONDHEJMO: S.ro Birger Nordstrand, Munkegt. 1, 7000 *Trondhejmo*.

Ekzamena Komisiono de N.E.L.
C. Støp-Bowitz
prezidanto.

Kunlaboro

Kelkfoje oni povas ekhavi la plej strangajn ideojn. Kaj devas esti la privilegio de redaktoro prezenti siajn ideojn en tiu ĉi maniero. Poste vi — membroj kaj estraranoj de kluboj kaj de la Ligo — diskutu, ĉu la ideo entute estas pripensinda.

Oni ja legas pri Skandinavia kunlaboro. Kaj jen nia ideo: Ĉu ni kreu Skandinavian esperantomembrecon? Mi proponas, ke la ligoj de la nordaj landoj invitu al nova kategorio de membreco, kun iom pli alta kotizo. Kaj tiuj mem-

broj ricevu la gazetojn de la aliaj nordaj landoj. Tiel la scio de literaturo, de programoj ktp de la aliaj landoj estus pli granda. Kaj per la pri granda eldonnombro la gazetoj eble ankaŭ sukcesus havigi anoncojn kaj tiel pli sekuran ekonomion?

Ĉu?

* R

La kontorfondaĵo

H. Sæther kr.	5,00
S. Ebeltoft »	4,00
Kj. Gustavsen »	150,00
B. Wærnes »	30,00
C.S.B. »	10,00

		kr. 199,00

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

*

La Universala Kongreso

anoncas, ke la nombro de aliĝintoj dum januaro kreskis al 942 el 33 landoj. El Norvegujo sin anoncis 13.

*

Sveda Esperanto-Federacio

havos kongreson en Gotenburgo 5—7 de aprilo (paske). Kongresejo la moderna hotelo Opalen. Dum la kongreso okazos muzika prezentado, diservo, ekskursoj ktp. Prezo: 145 sv. kr. (Loĝo kaj manĝo, eksterlandanoj ne pagas kongresokotizon.) Adreso: M. Andreasson, S-420 11 Hisings Kärra, Svedujo.

La unuaj Norvegaj Esperantistoj

(1891—1905)

Ellaborita de Lars Kåre Hunnes kun helpo de A. Holzhaus, Usono.

Kelkaj mallongigoj:

LE = «La Esperantisto»

LI = «Lingvo Internacia»

ZA = Zamenhofs Adresaro

* antaŭ personnomoj signifas blindulon

Jaro	Sezono Monato	Nomo, naskiĝ- k mortjaro, profesio k adreso	Serio k n-ro en ZA	Komentoj k fontindikoj
1891	Print.	<i>OLSEN Gunnar</i> (1864-1912) stud.filol., Calmeyergaden 10, Christiania.	5 1683	Serio 5 aperis en LE jun/1892. Estis <i>stud.filol.</i> , sed forlasis la studojn printempe 1891. Kom- encis kiel ĵurnalisto 1/8 1891. [Studentene fra 1885]
1892	Somere	<i>WISCHMANN Carl Christian</i> (1875-1962), stud. med., Stortingsgd. 4. Chra.	9 1958	Letero de 27/10 1959.
1893	Aŭtune	<i>RØNNEVIG Carl Magne</i> (1874-19), stud. med., Haugesund.	15 2978	Serio 15: n-roj 2900-3000 (1/7 1893-1/10 1893).
1896	Somere	<i>MIDTHUS Haldor</i> (1841-1906) instruisto, Lysekloster apud Bergen.	19 4484	Vizitis la svedan urbon Upsala somere 1896 kaj aĉetis siajn lernilojn tie. Estis membro de Upsala Esp. förening kaj abon- anto de LI 1896-1906.
1897	Aŭtune	<i>DAHLE L.</i> (18 -19), Kristiansund N.		Abonanto de LI de oktobro 1897.
1898		<i>ANDERSEN Hartvig</i> (1880-1952), akriĝisto, Fredrikstad.		Norvega Esperantisto 6/1952.
1899	Aŭtune	<i>SVENKE Harald Othar</i> (1871-19), distrikta policisto, Os apud Bergen.		Fariĝis distrikta policisto en Os 1898. Abonanto de LI de feb/1900. Adepto de Haldor Midthus.
1899	Aŭtune	<i>KAURIN Jacob Aars</i> (1871-1912), forstestro, Søfteland apud Bergen.		Fariĝis forstestro en Søfteland aŭtune 1899. Abonanto de LI de feb/1900. Adepto de Haldor Midthus.

Jaro	Sezono Monato	Nomo, naskiĝ- k mortjaro, profesio k adreso	Serio k n-ro en ZA	Komentoj k fontindikoj
1900	Febr.	<i>ENGBRETTSEN Nils A.</i> (18 -19-), librotenisto, Jevnaker.	21 5117	Serio 21: n-roj 5026-5567 (1/1 1900-31/12 1900). N-ro 5117 tiam respondus al feb/1900. Sendis leteron al P. Nylén, Upsala, printempe 1900. Nylén respondis 22/4 1900. Dua letero al Nylén de 25/5 1900.
1900		<i>ALLUM Fernand Jean Mathias</i> (1880-1928), komercisto, poste konsulo dana k norvega, Boulogne-sur-Mer, Francujo.		«Ora Libro»: «Korespondis kun Varsoviaj E. istoj jam en la jaro 1900.» Paul Boulet en letero de 17/12 1962: «Allum e-istiĝis post mi en 1902.» Boulet en letero de 5/2 1963: «Mi tute ne povas certigi, ke Jean Allum e-istiĝis en 1900. Povas esti, ke li korespondis kun varsoviaj samideanoj, sed tion mi tute ne konis.» En letero de 25/7 1901 adresita al Upsala Esp. förening, li deziris fariĝi membro de tiu klubo.
1901	Print/ somere	<i>HEIBERG Finn</i> (1879-19), farmacisto, Aalesund.		Serio 23: n-roj 6579-7699 (1/1 1902-31/12 1902). N-ro 6602 tiam respondus al jan. 1902.
1902	Jan.	<i>ERIKSEN Henrik</i> (18 -19) komizo, c/o M. Thoresen & Co., Lilletorvet, Kra.	23 6602	Estis membro de la klubo «Concordia», societo por inter- nacia interŝanĝo, fondita de Emile Lombard. En ĝia societo organo, «L'Estranger», Lom- bard enkondukis «Anguleton Esperantan», kaj per tiu ĉi «Anguleto» Davidson lernis Esperanton. Lombard mortis 28/4 1903.
1902	ĉ.	<i>DAVIDSON Tellef</i> (1848-1921), vojaĝanta sekretario de IOGT, Kristiano.		Estis membro de la klubo «Concordia», societo por inter- nacia interŝanĝo, fondita de Emile Lombard. En ĝia societo organo, «L'Estranger», Lom- bard enkondukis «Anguleton Esperantan», kaj per tiu ĉi «Anguleto» Davidson lernis Esperanton. Lombard mortis 28/4 1903.
1903	Somere	<i>LØCHEN Johannes</i> (18 -19), Waldemar Thranes gt. 36, Kristiano.	24 8523	Serio 24: n-roj 7700-9260 (1/1 1903-31/12 1903). N-ro 8523 tiam respondus al somere 1903.
1903	ĉ.	* <i>PEDERSEN Andreas</i> (1853-1938), vojaĝanta sekr. de IOGT, Trondhjem.		Verŝajne la unua blindula e- isto en Norvegujo. Adepto de Tellef Davidson, sed lernis la lingvon nur buŝe, ĉar brajla lernolibro ankoraŭ ne ekzistis en Esperanto (aperis nur en 1904).

(Daŭrigota).



FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Redaktoro: Odd Kolbrek,
Kaldbakkstubben 22, Oslo 9

lom pri la fervojoj en Nov Zelando

Mia korespondamiko Jack Boyd en Nov Zelando, donis al mi jenajn informojn pri la fervojoj en sia lando: «La lando konsistas el Norda Insulo kaj Suda Insulo.

Anglaj kolonistoj kiuj venis en 1850 (ili ne estis la unuaj) konstruis inter Ferrymead kaj Christchurch en Suda Insulo, la unuan fervojon de la lando. La ŝpuro estis 160,02 centimetroj. Ĝis 1871 estis en tiu Insulo konstruita 80,5 kilometroj da fervojoj.

En 1873 oni komencis konstrui fervojojn en Norda Insulo. Laŭ registara decido la ŝpuro estu 106,08 centimetroj. En 1900 la ŝtato transprenis la plej grandan parton de la fervojoj, kiu nun estas 5260,8 kilometroj. Uzataj por kaj pasaĝer- kaj vartrafiko estas en Norda Insulo 2296,5 kilometroj, en Suda Insulo 1607,7 kilometroj. Nur por vartrafiko en Norda Insulo 355,6 kilometroj, en Suda Insulo 1000,9 kilometroj. Nuntempe la rapideco de la eksprestrajnoj estas 80 kilometroj po horo. La mallarĝaj ŝpuroj kaj la montaro malhelpas pli grandan rapidecon, escepte de la motorvagonoj.

La vojaĝo inter Christchurch kaj Dunedin daŭras 7,5 horojn, inter Christchurch kaj Invercargill 11,75 horojn kaj inter Wellington kaj Auckland 13,5 horojn. En la vagonoj estas komfortaj seĝoj, grandaj fenestroj kaj necesej — kaj tualetejoj. La varmigado okazas vaporo. La dormvagonoj estas bone ekipitaj.

La Nova Zelanda Ŝtata Fervojo posedas pli ol 700 lokomotivojn, — la plej grandaj, la K B vaporlokomotivoj» pezas

148,34 tunoj kaj la plej malgrandaj 8,13 tunoj. En Norda Insulo estas uzataj modernaj, dizelelektraj lokomotivoj, sed en Suda Insulo ankoraŭ kelkajre vaporlokomotivoj, ĉar en ĉi tiu parto de la lando troviĝas multaj karbominejoj. La solaj elektraj trajnoj estas en la antaŭurba trafiko en Wellington kaj tra la Otira-tunelo laŭ longeco de 8,6 kilometroj. Laŭ la ĉeflinioj veturigas 181 dizelelektraj lokomotivoj pli ol 14483700 kilometroj jare kaj la dizellokomotivoj veturigas en la jaroj 1965—66 1609300 kilometroj.

En Nov Zelando estas multaj grandaj kaj malgrandaj riveroj kaj granda parto de la lando estas montara kaj pro tio la fervojoj havas multajn pontojn, viaduktojn kaj tunelojn. La plej altsituanta stacio estas Waiouru, 813,8 metroj super la maro, inter Wellington kaj Auckland. Laŭ distanco de 22,5 kilometroj ĉi tiu linio supreniras 1 metro po 50 metroj kaj laŭ 241,4 kilometroj 1 metro po 100 metroj. Laŭ distanco de 80,5 kilometroj la linio iras en akraj kurboj. Pro tio la rapideco de la trajnoj kelkdistanco de ĉi tiu linio reduktiĝas ĝis inter 40 kaj 66 kilometroj po horo.

De la ĉeflinio en Norda Insulo estas 161 kilometroj dutraka. Laŭ ĉi tiu ĉeflinio situas la famkonata spiralo Raŭrimu kun akregaj kurboj kaj du tuneloj, kaj ĉi tie la linio supreniras 1 metro po 52 metroj. Du 148,3 tunaj vaporlokomotivoj tiras 590 tunojn, sed du modernaj «D A» 79,2 tunaj dizelelektraj lokomotivoj tiras 650 tunojn kun pli granda rapideco supren laŭ la spiralo.

La plej longa fervojponto, trans la Rakaiarivero, en Suda Insulo estas 1,74 kilometroj longa. La plej alta viadukto, kiu nomias Mohaka, situas 96,9 metroj super la valfundo. Estas en Suda Insulo 81 kaj en Norda Insulo 108 tuneloj. La plej longaj estas Rimutaka, 8,8 km., kaj Otira, 8,6 km. Oni nur povas manĝi en

fervojrestoracioj sed baldaŭ konstruos mangvagonojn. La trafiko inter Norda Insulo kaj Suda Insulo okazas per aviadiloj kaj grandaj ŝipoj. Du ŝipoj, kiuj estas specialkonstruitaj transportas la fervojvagonojn inter Picton kaj Wellington. Ĉi tiu vojaĝo daŭras 3 horojn.»

RECENZOJ

Por amantoj de poezio

K. Kalocsay, G. Waringhien kaj R. Bernard: Parnasa Gvidlibro. Dua eldono reviziita kaj kompletigita. Eldonis Pola Esperanto-Asocio en kunlaboro kun «Heroldo» 1968.

Mi ne kredas, ke estas eble instrui al iu la arton verki poemojn. Oni estas — aŭ ne estas — poeto. Oni eĉ ne mem povas juĝi, ĉu oni estas vera poeto. Tion aliaj faru. Tamen ĉiu povas lerni iom pri la poezio, kaj devas iom lerni, ĉar sen scio, sen kono, estas neeble ŝati, ĝui, ami tiun plej belan literaturon.

La parnasa gvidlibro komencas per la komenco: Ritmo, akcento. Ĝi instruas la piedojn: jambo, trokeo, piriko, spondeo ktp., kaj ne nur instruas ilin per la ritmoskemoj (anapesto vv-), sed donas ekzemplojn el la esperanta literaturo, kaj tiu parto de la libro estas tiel interesa kaj instrua, ke oni povus deziri ĝin deviga por esperanta supera ekzameno.

Poste oni lernas pri la diversaj konstruoj de poemoj, tiaj, kiuj

havas antaŭe fiksitajn formojn, kiel hajko, robajo, tankao, rondelo, soneto ktp., kaj oni lernas el kiu lando devenas tiu kaj la precizan konstruon.

En la dua parto ni rime lernas rimi — kaj versskribi:

Se preta estas jam la rim-elekto
atentu pri l'efekta rimoplekto:
ne sekvu sin, nek staru proksim-
loke

rimparoj, asonancoj reciproke,
ĉar tio rimi — kaj misrimi —
ŝajnas,

per kio vi nur misefekton gajnas.
Kaj mankas en la rimefekt'
la spico,

se sekvas sin seninterrompa vico
da finvokaloj samaj. Do, arangu,
ke la finaĵoj sin konstante ŝangu.

La tria parto de la libro estas rimvortaro. Kaj certe: Ĉiu tradukanto aŭ verkanto ĝojos pro ĝi.

Haro.

Hilda Dresen:
Norda Naturo.
Stafeto 1968.

Hilda Dresen, estonino, debutis kiel esperanta poeto 1927, sed jam dum jaroj okupis sin per tradukoj. Je sia 70-jaraĝa jubileo Stafeto honoras sin per la poemaro Norda Naturo.

Oni vane serĉas en ĝi la moderanan, rafinitan poezion. Sed kiu

satas la pli simplan, pli tuj komprenatan arton, trovas en tiu kajero multajn perlojn. Bedaŭrinde kune kun tro naivaj versoj. Sed la ĉefimpreso estas bona, pri vere ĝuinda poemaro — al tiuj, kiuj ne nepre bezonas la modernismon.

R.

Por lernemuloj

William Auld: Paŝoj al plena posedo. Progresiga lernolibro. Eldonis Heroldo.

Eternaj komencantoj? Kial? Ja abundas la lernolibroj. Sed multaj lernolibroj estas tedaj. La moderna pedagogiko jam faris ilin malmodernaj, krome la plej multaj ja nur instruas la komencajn face-tojn de nia lingvo. Plena posedo — jen io tute alia.

Ankaŭ la lernolibro de Auld estas io tute alia. Per tridek paŝoj li gvidas la lernanton kun helpo de la plej bona literaturo, el kiu li ĉerpas ekzemplojn, kaj poste per instigaj demandoj kaj taskoj igas la lernanton analizi, pensi, kompreni kaj fine lerni. Tiuj ekzercoj estas interesaj, ili donas al la leganto la senton mem krei ion. Kaj ili estas tiel faritaj, ke preskaŭ sen rimarki tion, la leganto paŝas pluen. Ĝis li venas al la fino de la libro. Kaj jen do la plena posedo? Ne — Auld ankaŭ montras al pluaj paŝoj: Al nia literaturo. Certe li ne povas listigi la kompletan literaturon trezoron, sed faris elekton. Kaj jen post tio listo de adresoj — kien paŝi.

Ni rektas seriozan dankon al William Auld kaj Heroldo pro tiu lernolibro, taŭga por kursoj sub gvido de instruisto, kiel por la memstudanto, kiu volas penetri en nian lingvon.

Emulo.

Ni ricevis

J. C. Wells: The E.U.P. Concise Esperanto and English Dictionary, eld. The English Universities Press Ltd., Dondon 1969. 15 ŝil..

Norvega Kroniko

MARA VENTO, Haugesund, havis festkunvenon la 21-an de desembro. Klubaninoj bele ornamis la salonon kaj kreis intiman atmosferon.

La prez., Johs Sortland, bonvenigis. Poste O. J. Rønnevig prezentis kolorfilmon pri la UK en Hispanujo, krome pri Madrido, Toledo, Bilbao kaj pri homoj kaj trafiko en Londono.

Kiel kutime decembra kunveno parte estis dediĉita al Zamenhof, kaj O. Thormodsen en sia parolado ankaŭ mallonge kaj koncize informis al la ĉeestantaj neesperantistoj pri ideo kaj celo de Esperanto. Li ankaŭ memorigis pri la jubileo de al deklario de homaj rajtoj.

La antaŭ-kristnaska ellotado estis tre sukcesa. Ĉe la kafotablo oni multe kantis, ankaŭ kristnaskajn kantojn en Esperanto.

Det internasjonale språket - ESPERANTO

En orientering vesentlig bygget på et opplysningskrift utgitt av
The National Education Association, Washington.

TRENGER VI ET INTERNASJONALT SPRÅK?

De fleste er sikkert enige med USA's tidligere president, Truman, i at det «å lære andre nasjoner å kjenne er nødvendig for internasjonalt vennskap og samarbeide» og at «en av de største hindringer som står i veien, er de mange forskjellige språkene.»

Før i tiden ble internasjonale forbindelser besørget av eksperter som ofret flere år av sitt liv på språkstudier. I vår tid vil vi alle være med i dette samarbeidet, eller som den amerikanske statssekretæren George Allen uttrykte det: «Mennesker må tale med mennesker.»

Men hvordan skal dette bli mulig så lenge språkforskjellene danner nærmest uoverstigelige hindringer? Bill Cunningham i Boston Herald gir svaret: «Det kan aldri bli én verden før vi får et språk — et effektivt språk, som alle mennesker i verden kan tale, skrive og forstå.»

*

HVORFOR IKKE ENGELSK ELLER LATIN?

Et nasjonalspråk kan ikke tilfredsstillende de kravene man må stille til et internasjonalt språk, bl. a. fordi alle nasjonalspråk er for vanskelige å lære og fordi stormaktene ikke kan bli enige om hvilket språk man skal bruke.

Latin ble brukt som verdensspråk i flere hundre år, men det har mistet kontakten med det praktiske liv. — Den svenske

språkmann, professor Bjørn Collinder ved Uppsala Universitet, belyser det internasjonale språkproblemet slik:

«Vad vi behöver är ett förenklat latin, ett rationellt, enkelt språk, som bevarar det latinsk-grekiska ordförrådet, som redan är internationellt, och som samtidigt är så enkelt och regelbundet, att var och en kan lära sig detsamma redan i folkskolan. Lyckligtvis har vi ett sådant språk: ESPERANTO.»

*

ESPERANTO ER LETT OG INTERNASJONALT

Esperanto er det logiske svaret på spørsmålet. Det er et vitenskapelig formet internasjonalt språk, bygget opp av elementer fra våre store kulturspråk. Det er så enkelt at det kan læres på en brøkdelen av den tid man trenger for å lære et nasjonalspråk.

Ordforrådet er så internasjonalt at man straks kjenner igjen en stor del av ordene (telefon, bilde, apparat). Et system av forog etterstavelser gjør det mulig å danne et stort antall nye ord av noen få tusen rotord. På norsk har vi f. eks. ordene varm, lunken, het, kald, kjølig, som må læres hver for seg. På Esperanto er alle beslektede ord dannet av én og samme ordstamme, slik at antall ord som virkelig må læres, reduseres til et minimum. Eksempel: *varma* (varm), *varmeta* (lunken), *varmega* (het), *malvarma* (kald), *malvarmeta* (kjølig).

LETTE UTTALEREGLER

Hvert ord i Esperanto uttales som det skrives og skrives som det uttales. Det finnes ikke «stumme» bokstaver, som på norsk og andre nasjonalspråk. I ord på mer enn én stavelse faller trykket på nest siste stavelse, f. eks. *banana*, *profesoro*, *Ameriko*, *familio*. Hver eneste av språkets 28 bokstaver har sin bestemte lyd. De fleste bokstavene uttales som på norsk. Siden enkelte bokstaver uttales litt forskjellig i de enkelte ord på norsk, skal man særlig merke at *o* uttales som i «godt» og *u* som i «tung». Bokstaver som ikke brukes i norske ord: *c* uttales «ts» som i «sats», *ĉ* «tsj» som i «tsjekkisk», *ĝ* «dsj» (stemt) som i «gin», *ĵ* summende «sj» som i fransk «journal», *ĝ* «skj» som i «skjold», *z* er summende *s*.

ENKEL GRAMATIKK

Esperantos grammatikk består av enkle regler uten unntagelser.

Alle substantiver har endelsen *-o*: *kato* (katt). Adjektivene har endelsen *a*: *varma* (varm), *granda* (stor), *rapida* (hurtig), *malrapida* (langsom). Adverbier dannes med endelsen *-e*: *rapide* (hurtig), *malrapide* (langsomt). Alle verbene har faste endelser for tider og former:

- i: trinki (å drikke)
- as: trinkas (drikker)
- is: trinkis (drakk)
- os: trinkos (skal drikke)
- u: trinku! (drikk!)

Noen pronomener: *mi* (jeg), *vi* (du, De, dere), *li* (han), *ŝi* (hun), *ili* (de). Det er bare én bestemt artikkel: *la*. Ubestemt artikkel fins ikke. Oversett nå: *La granda kato trinkas rapide*.

HVORDAN SER ESPERANTO UT?

Prøv selv hva De kan forstå før De har lært noe! (Betoningen skal alltid være på nest siste stavelse):

Inteligenta persono lernas rapide la internacian lingvon Esperanto. Esperanto estas la moderna, kultura lingvo por la tuta mondo kaj la praktika solvo de la lingva problemo.

Muziko havas internacian karakteron. Muzik-notoj estas formo de internacia lingvo. Violono kaj piano estas muzik-instrumentoj.

Hundo kaj kato ne estas amikoj. Granito estas ŝtono. La vintro ne estas varma.

Tabako estas natura produkto. Mi havas grandan cigaron. Ŝi havas ringon sur la fingro. La prezidanto prezentis la financa raporton al la direktoroj de la industria kompanio.

(Selvsagt er ikke alle ordene i Esperanto så lik de tilsvarende ordene på norsk, som i disse eksemplene!)

LITT OM ESPERANTOS HISTORIE

Esperanto ble offentliggjort i 1887 av dr. L. L. Zamenhof, Warszawa. Han gav ut sin lille bok under pseudonymet *Doktoro Esperanto* («Esperanto» betyr håpende). Esperanto ble siden navnet på språket selv. Det vakte stor interesse i en rekke land, og snart ble de første Esperanto-foreninger stiftet og den første Esperanto-avis trykt. Det varte ikke lenge før Esperanto var i bruk i alle verdensdeler.

Det ble holdt kurser, foreninger ble stiftet i stadig flere land, og det utkom flere og flere aviser og tidsskrifter på Esperanto. I 1905 holdt esperantistene sin første verdenskongress. Utviklingen har fortsatt, bare hemmet av to verdenskriger. — Hittil har millioner lært Esperanto. Verden over brukes det som internasjonalt språk og for-

midler kontakt over landegrensene innen de mest forskjellige fagområder og interesseområder.

ET LEVENDE INTERNASJONALT SPRÅK

Esperanto er blitt det levende internasjonale språk som verden trenger. Det er ikke lenger et prosjekt, men et ferdig språk som har stått sin prøve. Det har allerede lenge av foregangsfolk vært brukt i kulturens og det praktiske livs tjeneste.

Tusener av bøker er utgitt på og om Esperanto, både originale og oversatte verker. Litteraturen omfatter dikt, skuespill, romaner, vitenskap, kunst, religion, politikk, teknikk etc. Det utkommer nå ca. 100 blad og tidsskrifter på Esperanto.

I radio er det regelmessige sendinger på Esperanto fra en rekke land, deriblant Brasil, Bulgaria, Italia, Jugoslavia, Spania, Schweiz, Polen, Østerrike.

Esperanto brukes ved internasjonale kongresser, ved varemesser, i internasjonalt handelssamkvem, i reiselivet osv.

KORRESPONDANSE OG REISER

Mange har stor glede og nytte av Esperanto i brevveksling med mennesker i andre land. Det kan være en vennskapelig

utveksling av tanker, hvor man forteller om sitt liv og levevilkårene i sitt land, eller det kan dreie seg om tekniske problemer av felles interesse. I skolene blir internasjonal brevveksling en oppmuntring for elevene.

En forutseende turist som har lært seg Esperanto, er ikke henvist til en mer eller mindre vellykket kontakt med bærere, konduktører, portier og guider. Esperantistenes Verdensforbund (Universala Esperanto-Asocio) har opprettet et system av «delegater» (en slags «Esperanto-konsuler») på en mengde steder rundt i verden. Adressene til delegatene finnes i forbundets årbok. Har man på forhånd skrevet til delegater på de steder man skal besøke, møter vedkommende opp og gir den bistand man har bruk for. Slik kan turistene møte mennesker med samme interesser som de selv har — mennesker som ikke virker fremmede, fordi språket er felles. Nær 3500 slike delegater tsår idag til tjeneste, og ikke bare for turister — man kan også skrive til dem når man ønsker opplysninger om ett eller annet i et fremmed land.

ESPERANTO — FN — UNESCO

I 1950 fikk FN overlevert en henvendelse fra 17 millioner mennesker i alle verdensdeler om å ta opp spørsmålet og medvirke til å utbre bruken av Esperanto. Blant dem som hadde undertegnet henvendelsen var Vincent Auriol (Frankrikes president), Willem Drees (Nederlands statsminister) og Josef Cyrankiewicz (Polens statsminister). Det ble overlatt UNESCO (FN's organisasjon for utdannelse, vitenskap og kultur) å behandle henvendelsen. I 1954 vedtok UNESCO's generalkonferanse i Montevideo en resolusjon som fastslår at de resultater Esperanto-bevegelsen har nådd, helt ut svarer til UNESCO's formål, og at UNESCO vil holde seg à jour med Esperanto-arbeidet. Samtidig ble Universala Esperanto-Asocio

TIL KURSER OG SELVSTUDIUM

«Systematisk kurs i Esperanto»
av Seppik og Malmgren (kr. 4,00)

«Nøkkel til Esperanto»
(kr. 0,75)

Hos bokhandleren eller i post-
oppkrav fra

ESPERANTOFORLAGET A/S
Boks 942, Oslo 1. Postgiro 100.31

De behøver ikke å vente på at
«noen skal sette noe i gang»!

5 store studiebreve kr. 23,00

Rabatt for studieringer

Skriv etter opplysninger

BREVKURS

NORSK ESPERANTO-FORBUND
(Afdeling for Brevundervisning)

Postgirokonto 100.33

Boks 942, Oslo 1

anerkjent som rådgivende organ for UNESCO.

En ny henvendelse om Esperanto ble overlevert FN i 1966 i sammenheng med året for internasjonalt samarbeide, denne gang på vegne av over 74 millioner mennesker i alle verdensdeler. Blant nordmenn som hadde undertegnet denne henvendelsen, var statsminister Per Borten, en rekke regjeringsmedlemmer og et betydelig antall stortingsrepresentanter. Landsorganisasjonen i Norge var blant de 4 000 organisasjoner som sluttet seg til henvendelsen. — Fortegnelsen over dem som har underskrevet henvendelsen, viser at tanken om et internasjonalt språk har trengt inn på alle områder av samfunnslivet og stadig får øket tilslutning.

ESPERANTO I SKOLENE

I stadig flere land blir det gjort forsøk med Esperanto-undervisning i skolen, og antallet skoler som innfører Esperanto som fag på timeplanen, øker stadig. Også i Norge har det vært forsøksundervisning i Esperanto, ved gymnasier i Oslo og Sarpsborg.

Særlig de blinde har i høy grad innsett hvilket verdifullt hjelpemiddel Esperanto er for internasjonal kontakt, og Esperanto undervises ved svært mange av blinde-skolene i verden, også ved de norske.

Forsøk som har vært gjort, bl. a. i Eng-

land og Finnland, viser at elever som lærer Esperanto som første fremmede språk, ganske snart kommer så langt at de kan begynne å bruke sine kunnskaper. Dette gir elevene tro på at de kan lære å mestre fremmede språk og større mot på å gå i gang med de vanskeligere nasjonalspråkene. Esperanto er altså et ypperlig grunnlag for studiet av andre fremmede språk.

HVA DE KAN GJØRE

Esperanto er allerede idag til stor nytte på mange områder. Det kan utrette meget mer hvis flere mennesker lærer språket og hjelper til med å utbre det. Esperanto-bevegelsen er ennå på mange måter på pionérstadiet og trenger interesserte medarbeidere.

De kan lære Esperanto ved selvstudium eller ved ett av de kurser som hvert år holdes rundt om i landet av Esperantoforeningene og Friundervisningen. Studer De på egen hånd, vil De ha god nytte av brevkurset.

De har ikke holdt på lenge før De kan begynne å bruke språket på områder som interesserer Dem. De vil snart oppdage at De har meget igjen for det.

Forteller De andre om Esperanto, eller danner De en studiering, kan De bidra til Esperanto-bevegelsens arbeide for internasjonal forståelse.

Cetere estis societaj ludoj, marŝoj kaj dancado, kaj regis vigla festetoso ĝis post meznokto. La muzikon prizorgis H. Lokna.

Rap.

*

Sanda Esperantoklubb

havis sian jarkunvenon 17.1.69 en la hejmo de s.ino Berge. La jarraporto montris aktivecon per bonaj kunvenoj, propagando por Esperanto en lokaj gazetoj, kaj per la loka radio. Sed malgraŭ diligenta laboro, la membronorbro restas konstanta.

Kiel nova estraro elektiĝis: prez. Elna Matland, vicprez. Olav Andersen, ano Norman Birkeli. Supl. Karen Berge kaj Ida Veka. Revizoroj Aagot Bjerke kaj John Malmquist. Prop. ĉefo kaj studgvidanto Johan Matland. Radiorepr. kaj librokomiŝiulo Arthur Bjerke. Gaz. repr. Norman Birkeli.

Post bona regalo la kunveno daŭris. Ni laŭlegis cirkulerojn de NEL, kaj multaj membroj abonis «Norvega Esperantisto» por eks-terlandaj geamikoj.

De la fama nederlanda kantistino Ramona van Dalsem ges. roj Matland ricevis sonbendon kie ŝi kantas treege bele ĉarmajn kantojn en Esperanto, kaj kun granda intereso kaj entuziasmo la membroj aŭskultis al tiu bela programero. Fine s.ino Berge deklamis en inda maniero la faman «Preĝo sub la verda standardo.»

EMO.

Grupo Esperantista de Trondheim
Dum la aŭtuno 1968 ni havis ĉi tiujn kunvenojn:

13/9. La hinda slojdinstruisto Abani Halder vizitis la klubon kaj rakontis pri la eduksistemo kaj la eduka situacio en Hindujo hodiaŭ. F-ino Lif Berg fariĝis honora membro de la Grupo pro la fidela, fervora kaj sindonema laboro por la disvastigo de Esperanto. Ŝi estas la kvara persono, kiun la Grupo tiele honorigis.

11/10. S-ro Karterud donis raporton pri la lasta koresponda kaj sonbenda kurso por blinduloj. S-ro Mjøen deklamis plurajn poemojn de J. H. Wessel, S-ino Anna Kolstø rakontis pri vizito al Oslo fare de ĉefaj esperantistoj. Ŝi donis interesajn informojn pri la situacio en Ĉeĥoslovakujo.

15/10. La sekretario donis raporton de la UN-kurso en Stjørdal la 11an kaj 12an de majo. Li ankaŭ rakontis pri la Biblio en Esperanto.

29/10. S-ro Arnold Sjøund de FN-Sambandet faris tre interesan paroladon pri UNICEF, la infana fonduso de UN, S-ro Rolf Husby montris la filmojn «Infano en Eŭropo» (pri la laboro de UNICEF en Grekujo) kaj «Provoko» (pri la sana projekto de Norsk Utviklingshjelp en Kerala, Hindujo).

12/11. La prezidanto donis raporton de la UN-kurso en Selbu la 2an kaj 3an de novembro. Poste oni diskutis la venontan laboron de la Grupo.

26/11. Oni diskutis la dramon «Revenantoj» aŭ «Reaperantoj» de

Ibsen, precipe la bezonon de plibonigita traduko en Esperanton de la dramo. S-ro Mjœen deklamis tri poemojn de Jakob Sande.

10/12. Ni havis nian jaran kristnaskan kaj Zamenhofan feston en la Misia Hotelo. S-ro Karterud pianoludis kaj deklamis, s-ro Termén legis la kristnaskan evangelion, kaj s-ro Mjœen faris la paroladon por Zamenhof per laŭlegado de parolado de la majstro mem, «Pri la instrua kaj eduka signifo de la Esperantokongresoj», farita en St. Petersburg 1910.

Grupo Esperantista de Trondheim
14/1. I. a. la prezidanto, s-ro Hunnes, prezentis la antologion «Interesa legaĵo. Internacia legolibro», kompilita de Aleš Berka kaj presita en Ĉeĥoslovakujo. En la libro ankaŭ troviĝas la fabelo pri la tri Bokoĵ Bruse, tradukita de Grupo Esperantista de Trondheim. S-ro Haugen referis leteron de s-ro Tibor Sekelj, Beograd.

28/1. La Grupo havis sian jarkunvenon. En la raporto por la pasinta jaro estas menciita, ke la Grupo aranĝis 14 ordonarajn kunvenojn, 1 festkunvenon kaj 1 ekskurson. Dum la jaro la Grupo ricevis ankoraŭ 40 librojn de s-ro Voltersvik. Kune kun la aliaj libroj donitaj de li kaj libroj donitaj de s-ro Rian kaj s-ro Hunnes la biblioteko de la Grupo nun enhavas 160 librojn. La jarkalkulo por 1968 bilancis kun la sumo kr. 1 787,68. La kapitalo kreskis ĝis kr. 985,88. En la jarkunveno oni decidis havi monatajn ordinarajn kunvenojn kaj studkunve-

nojn inter la ordinaraj kunvenoj. Oni elektis jenan estraron: s-ro Lars Kåre Hunnes, prezidanto (reelekto), Arne Olav Mjœen, vicprezidanto (reelekto), Birger Nordstrand (novelekto), Kristian Fleischer, kasisto (reelekto), f-ino Else-Margrethe Müller, studgvidanto (reelekto), s-ino Anna Kolstø kaj f-ino Lif Berg, anstataŭantoj (reelekto). D.T.

Klubo Esperantista en Oslo

la 9-an de januaro 1969 aranĝis informkunvenon en Deichmanske filio Tveita. La vicprezidanto Thor Magnus Carlsen gvidis la kunvenon. Universitata lektoro Carl Støp-Bowitz rakontis pri Esperanto kaj la norvega iluzio ke la angla lingvo sufiĉas kiel internacia lingvo.

La partopreno estis bona, malgraŭ ne tro favora vetero. La interparolado post la prelego estis tre vigla kaj evidentiĝis ke la ĉeestantoj interesiĝis pri Esperanto.

Kiel rezulto de la kunveno la klubo decidis aranĝi kurson por komencantoj en Tveita ĉar proks. 10 personoj anoncis sin al la kurso.

20/1.69. Tom Arbo Høeg prelegis pri «La oleoserĉado en Nord-sjøen». Li donis superrigardon pri la diversaj flankoj kaj agoj rilate al la afero, ekz. La Truman Doktrino en 1945, La Ĝeneva Konferenco en 1958, kaj la norvegaj reguloj. 30 landoj ellaboris regulojn.

La unua evidenta rezulto de la serĉadoj estas botelo da oleo kiun la Esso Asocio antaŭ nelonge donacis al nia Ministro por Industrio, S. Walter Rostoft.

Tom Arbo Høeg fine diris, ke la norvegaj reguloj estas bonaj, vasthorizontaj kaj fleksiblaj. La prelego postulis grandan atenton kaj cerbo-aktivecon de la aŭskultantoj.

C. Støp-Bowitz prizorgis la tielnomatan «10-minutan lingvoinstruadon» pri esperantaj geografiaj nomoj, proponitaj de speciala komitato, en kiu C. Støp-Bowitz estas membro. La preleganto donis multajn ekzemplojn pri la malfacilaĵoj kiujn la komitato renkontis en sia laboro. La provizora rezulto oni povas studi sur mapo eldonita kaj kiu kostas kr. 8,50.

Raportis Harda Danielsen.

Orienta Distrikto ekagas

Unu el la ĉefaj taskoj de la distriktaj organizaĵoj estas krei E-movadon en lokoj, kie tia movado ne ekzistas. Post sufiĉe longdaŭra pasiveco Or. D. nun ekokupas sin pri tiu tasko, kaj la unua urbo, kiun ni intencas esperantigi, estas Lillehammer.

La 15-an de januaro okazis informkunveno pri E-o en la Nansen-lernejo. C. Støp-Bowitz prelegis pri E-o kaj respondis al demandoj, kaj oni montris ekspozicion de E-a literaturo. Bedaŭrinde partoprenis preskaŭ nur lernantoj de la Nansen-lernejo. Des pli ĝojige estas, ke eksterordinare granda nombro de ĉeestantoj aliĝis al studrondo. Tia rondo devas esti efika, ĉar jam antaŭ Pasko finiĝos la kurso de la Nansen-lernejo.

La dek partoprenantoj kunvenas dufoje semajne, sub gvido de unu el la lernantoj, s-ro Jørn Herstad el Drammen, kiu montriĝis vere

entuziasma adepto de E-o. De tempo al tempo la studrondon asistas s-ino Danuta Kubiak, pola E-istino nun loĝanta en Lillehammer.

Tamen ni ne sukcesis atingi la loĝantaron de la urbo mem. Tial ni ankaŭ volis prelegi pri E-o en la gimnazia societo de Lillehammer. La 30-an de januaro okazis la prelego. Ĉi-foje ĝin faris Otto Prytz, kaj ankaŭ en tiu kunveno ne mankis E-a literaturo. Ĉeestis 35 personoj, plejparte gimnazianoj, kaj deko da ili mendis studmaterialon. S-ro Hertsad ne donos al la mendintoj ŝanĉon forgesi la mendojn, kaj li certe ne forlasos Lillehammer antaŭ ol funkcios E-a kurso aŭ studrondo en la tiea gimnazio. Ankaŭ al la gimnazianoj s-ino Kubiak estas preta instrui.

Sed ni ankoraŭ ne atingis la plenkreskan loĝantaron, kaj tio devigas nin trian informkunvenon pri E-o. Tia planado nun ne estas tro malfacila, ĉar s-ro Herstad estas preta ekspluati ĉiun realecan eblon. La organizan laboron li faras kun fakula kapablo.

Antaŭ la prelego en la Nansen-lernejo ni okazigis ekspozicion de E-a literaturo en la popola biblioteko de Lillehammer, kaj la prelegon ni anoncis en la loka gazetaro. Ankaŭ post la kunveno aperis raporto en la gazetaro. Antaŭ la prelego en la gimnazia societo s-ro Herstad skribis artikolon, kiun la lokaj gazetoj publikigis sur favoraj paĝoj. Herstad ankaŭ promesis raporti por la gazetaro pri tiu prelego. Sed tio ne estas ĉio: en la

kadro de la distriktaĵoj programoj de la Norvega Radio oni planas disaŭdigi raportaĵon pri la agado de la E-grupo ĉe la Nansen-lernejo.

El ĉi tio mi emas konkludi, ke la ekzistanta favora sinteno al E-o ne estas sufiĉe ekspluatata. Sed mi ankaŭ faris alian konkludon, kiu igis min skribi tiom amplekse pri la afero: sen tro granda fortostreĉo eblas atingi kontentigajn rezultojn!

Otto Prytz.

Studenta Esperanto-societo

okazigis sian ĝeneralan kunvenon la 29-an de januaro en la universitato ĉe Blindern. Post aprobo de la jarraporto kaj kalkulo por 1968, oni reelektis la tutan estraron kaj komisiitojn (kompleta listo aperis en Norvega Esperantisto, nov.—dec. 1968).

Poste oni pridiskutis la estontan agadon de la societo, kaj la estraro estis petata aranĝi membrokunvenon kun prelego pri unu flanko de la E-movado. O. Prytz.

Adopta plano

La skolta Esperantista Ligo lanĉis adoptan planon. La rilatoj inter SEL kaj la skolta movado lasttempe rapide ŝanĝis. La kialoj estas pluraj:

1. La sukceso de la dulingva jamboreo en Essex, Britujo, pasint-somere.
2. La dubo de la skoltgvidantoj pri la valoro de grandegaj skoltkunvenoj.
3. La timo pri sukceso dum mond-jamboreo en Tokio 1971 pro la lingvobaroj.

4. La ŝanĝita opinio de la Monda Skolta Oficejo pri Esperanto.

Nun ni uzu la eblecojn. Tial la «Adopta Plano»:

Ni invitas al ĉiu esperantisto, ĉiu klubo, adopti la lokajn skoltajn grupojn, kaj donaci al ili ekzempleron de nova aperonta libro. En la libro estas loko por nomo kaj adreso de la adoptinto, kio faciligos postajn kontaktojn. La libro estas speciale por skoltoj. La donaco okazu — se iel eble — je la unua de septembro 1969.

Pro la fakto, ke ne nur vi, en via urbo, sed ĉie en la mondo, iu donacas tiun libron, la skoltoj povos kompreni — kaj vi klarigi — la praktikan valoron de la lingvo.

La Centra Komitato de SEL en la sama momento prezentos la libron ĉe la plej altaj skoltaj instancoj, kaj ni petis al la naciaj esperanto-asocioj fari la samon ĉe la landaj estraroj de skoltaj kaj skoltinaj asocioj.

La ofsetita libro kosta 5 kronojn, kun rabato de 25 % ĉe mendoj de 10 ekz. Oni mendu ĉe J. K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam, Nederlando.

Subtenantaj membroj de N. E. L.

- 1968: A. Armanis, Lier
A. Eidsvig, Grimstad
Sigrid Hole, Storsjøen
Trygve Raimar, Meistervik
John Selbakk, Oslo
Anny Somdalen, Hønefoss
Knut Syversen, Greåker.
- 1969: Ole Børresen, Sandefjord
A. Armanis, Lier
Wilfred Hortman, Finse
Anny Somdalen, Hønefoss.

Korespondu!

Mi volus interŝanĝi ĉejajn insignojn kun norvegaj. Se vi ne kolektas, vi tamen eble havas kelkajn, per kiuj vi povas pliriĝigi mian kolekton. Ladislav Weiss, Ceska Lipa 1501, Ĉeĥoslovakujo.

*

29-jara medicina asistanto dez. kor. kun geesperantistoj pri ĉiaj temoj. Interesiĝas speciale pri belartoj, danomuziko, kolektado de helikoj kaj konkoj. I. L. Fügedy, Pharmacological Research Laboratory, Tó u. 1—5, Budapest IV, Hungarujo.

*

Studento dez. kor. kun genorvegaj kaj aliaj geskandinavoj. Intereso: literaturo, arto, filozofio, poŝtmark- kaj bildkartkolektado. Muic Stjepan, A. Butorac 13, Zagreb, Jugoslavujo.

*

49-jara laboristo dez. kor. kaj interŝ. poŝtkartojn, poŝtmarkojn, gazetojn kaj stereoskopajn bildojn. Frána Škrla, Havlíčkova ul. ĉp. 1265/SPL/ Kromeriz, Ĉeĥoslovakujo.

*

17-jara korea studento dez. kor. Interesiĝas pri legado, muziko, vojaĝado kaj korespondado, kaj kolektas poŝtmarkojn, Esperantaĵojn, bildkartojn, insignojn, sed havas nenion el Norvegujo. S-ro Jeong Jong-Hyu, P.O. Box 106, Gwangju, Koreujo.

*

33-jara japana gimnazia instruisto, fraŭlo, dez. kor., precipe kun geinstruistoj kaj geknaboj. Interesiĝas pri belartoj, muziko k.a. temoj, interŝanĝas fotojn, sonbendojn, poŝtmarkojn, bildkartojn. S-ro Fusacugu Kido, Gamoo Higasi 6—51, Kosigaja Saitama, 343-Japanujo.

Aleksandro Kajti, str. Terez 9, Pecs, Hungarujo, 50-jara oficisto, nuntempe invalida pensiulo, dez. kor. pri ĉiuj temoj. Kolektas kaj interŝanĝas esperantaĵojn.

*

16-jara abiturienta lernanto ŝatus interŝanĝi poŝtkartojn kun samidean(in)o. Oscar Serra, Mallorca 440, Barcelona, Hispanujo.

*

Volonte mi korespondadus kun fraŭlino aŭ sinjorino el Norvegujo. Erwin Richter, Hagnasse 45, D-8182 BAD WIESSEE, Germanujo.

*

17-jara junulo dez. kor. pri dancmuziko kaj literaturo. Valentin Trifonov, «Al. Stamboliiski»-1 Kneja, Bulgarujo.

*

Komencanto dez. kor. pri Esperantomovado, geografio, fotografado, turismo k.t.p.; kolektas poŝtmarkojn kaj mone-rojn. Livio de Nardi, Condominio «Giovanni Pascoli», Via Lourdes 8/12, I-31015 CONEGLIANO VENETO, Tr-eviso, Italujo.

*

25-jara ĉhino, filologo, dez. kor. kun norvega sinjorino. Adreson peras: Josef Pivokonsky, Kristine Bonnevie vei 4, Oslo 5.

*

Kelkaj rumanaj geesperantistoj dez. kor.: 1) S-ro Ioan B. Keles, Kiskani, Braila, 2) Maria Lazarescu, kontoristino, Mingi Brayu 298, Braila, 3) Elgna Brezuica, kontoristino, Bd. Cuza 74, Braila, 4) Mariana Balaban, Str. Oorobanti 280, Braila, 5) Filip Ariadna, Str. Republicii 82 A, Braila, 6) Inĝ. Paul Roman, Str. Hippodrom 218, Braila, ĉiuj Rumanujo.

*

NOTOJ

Hungara Esperanto-Asocio organizos Internacian Esperanto-Ekspozicion de Infandeseĝnaĵoj 24.a de majo — 15.a de junio 1969 en Budapeŝt. Ĉiu infano, kiu lernas Esperanton, ĝis 14-jara, povas partopreni. La temo estas «La ludo». Desegnaĵoj havu 30 x 40 cm. La plej bonaj ricevos altvalorajn premiojn. La kovertojn bonvolu filatele afranki, ankaŭ ili estos ekspoziciataj. Materialon sendu antaŭ la 1.a de majo al Johano Ingusz, XIII Tomori u. 2, Budapeŝt.

La Centra Dana Esperantista Ligo iniciatis intensan informan agadon ĉe 3—4.000 «ŝlosilaj» personoj, i.a. ministroj kaj parlamentanoj. Kaj ĉar la ministroj kaj kulturo, instruado kaj eksterlandaj afero estas inter la plej gravaj C.D.E.L. deziras doni fortan impreson pri la uzado de esperanto. Tial ĝi petas alsendon de 3 ekz. de ĉiuspecaj broŝuroj, klubaj informiloj, revuoj, libroj ktp. Post la transdono la kontribuintoj ricevos raporton. Adreso: Inĝeniero Ib Schleicher, Ved Bellahøj 21.13., DK-2700 København BRH.

Esperantista Kulturdomo, Gressillon aranĝas kurson dum la Pasko kaj kurson «Esperantaj studoj kaj la franca lingvo per Esperanto» 29.an de junio — 13.an de julio. 8.a Kultura Semajno okazos 13.an de julio — 20.an de julio, kaj «Kul-

turaj kaj Turismaj Internaciaj Ferioj» 20-an de julio — 3.an de aŭgusto. Poste denove Kulturaj Esperantistaj Semajnoj. Informoj ĉe Kastelo Gresillon, 49 — Bauge, Francujo.

Profesoro Egami eldonos sciencon verkon «La serĉado de la vivo» en Esperanto. Li estas profesoro de biokemio ĉe la Universitato de Tokio, membro de la Konsilantaro de la Internacia Unuiĝo de Biokemio, honora membro de la Usona Societo de Biologiaj Kemiiistoj ktp. Li estas ankaŭ prezidanto de Japana Esperanto-Instituto.

Belartaj Konkursoj 1969 kiel kutime okazas en kombino kun la UK. La konkursaĵojn oni sendu al S-ino E. Lapenna, Nova Ves, 32/III, Zagreb, Jugoslavujo antaŭ la 31.an de marto. Oni konkursos en la kvar branĉoj: Originala poezio (maksimume 108 versoj per 1—3 poemoj). Tradukita poezio (sama maksimumo. La tradukanto zorgu pri represa rajto). Originala prozo (2—3000 vortoj). Originala drameto.

La konkursaĵoj estu maŝinskribitaj, kaj oni sendu 4 ekzemplerojn (+ 4 ekz. de la originalo ĉe tradukoj). Konkursokotizo kr. 3. La konkursaĵoj portu pseudonimon, kaj en fermita koverto nomo, adreso; membromarko de UEA (aŭ kongresnumero) akompanu.

Stanislaw Biesiada, Czestochowa 1, P.O.Box 44, Polujo, serĉas ekzempleron de la stampo el 1961 kun «Norsk Esperanto-Forbund

50 år». Rekompence li sendos alian esperanto-stampon.

Harald Skavold, Setså, sendis afablan leteron kun varma rekomendo de la libro «Cent Himnoj» de H. A. Rosbach. La enhavo de la letero estas tiom flata, ke ni ne kuraĝas publikigi ĝin, sed kun deca ruĝiĝo mencias ĝin ĉi tie. La libro estas havebla ĉe Esperantoforlaget aŭ ĉe la aŭtoro.

Internacia Junulara Kongreso okazos 3.—10. de aŭgusto en Tyresö, Svedujo. Tyresö situas 17 km sude de Stockholm. Aliĝu per alskribo al 25a IJK, Myggdalsvägen 123, S-135 00 Tyresö, Svedujo.

(Daŭr de p. 13)

«Kaj tiel bona, kiel iu ajn angla,» aldiris Hans; li estis eksmaristo.

«Prave, prave! Tiel bona, kiel iu angla!»

«Ĉu vi kredas,» Hans daŭrigis, «ke mi forŝanĝas tiun fromaĝon al la viando, kiun tiuj hodiaŭ eble manĝis? Sed mi diru: mi povus aĉeti pli grasan tagmanĝon, sed mi formetas ĉiutage ok ŝilingojn por ankaŭ povi manĝi mian fromaĝon dumvintre, ĉar la vintro estas longa al ni masonistoj. Mi ja tiom ŝatas ĝin, ke mi ne povas toleri eĉ la penson frapi — kiel multaj miaj kunlaborantoj — la pordon de la deviglaborejo jam antaŭ kristnasko.»

Denove ĉapitro el la historio de la mizero, kun surskribo «la deviglaborejo» — ne «la punejo» aŭ

«la sklavejo», sed sufiĉe terura.

«Tie mi ne ricevas mian fromaĝon, kaj sen ĝi mi ne povas vivi.»

Ho, brave kaj saĝa Hans Jakobsen! Estas forto kaj kusto en tiu fromaĝo, kiun vi manĝis al via pano. Ĝi estas nenova norvega — kaj tiel bona, kiel iu ajn angla.

La knabo kaj la diablo

(de Jørgen Moe)

Iam knabo iris laŭ vojo kaj manĝis nuksojn. Li trovis iun kun vermtruo. Samtempe li renkontis la diablon.

«Ĉu prave» diris la knabo, kion oni diras, ke la diablo povas igi sin tute malgranda, kaj sin premi tra pinglotruo?»

«Jes!» respondis la diablo.

«Ho, lasu min vidi tion, vin premu en tiun ĉi nukson!» petis la knabo, kaj la diablo faris.

Kiam tiu sin estis preminta tra la vermtruo, la knabo fermis ĝin per lignopeceto. «Nun mi prizoniĝis vin,» li diris, metante la nukson en la poŝon.

Baldaŭ li venis al forĝejo, tien li iris, kaj petis, ke la forĝisto frakasu la nukson.

«Tio estas facile» diris la forĝisto, metis la nukson sur la amboson kaj frapis per la plej malgranda martelo, sed la nukso ne frakasiĝis. Tiam li prenis pli grandan martelon, sed ĝi ne estis sufiĉe peza. Eĉ pli granda martelo ne taŭgis. Tiam la forĝisto koleriĝis, prenis la martelegon. «Mi ja frakasigos vin —!» li diris kaj bategis laŭ sia forto; kaj jen la nukso

Ĉar tiam forbrulis la knaba fort'
kaj viv-valor',
nur cindro iĝis la viv'; al mort'
ĝi iris for.

frakasiĝis, kaj la duono de la teg-
mento forflugis, kaj la forĝejo
knaris, kvazaŭ ĝi forfalus.

«Ŝajnas, ke la diablo estis en la
nukso» diris la forĝisto.

«Jes, li estis,» diris la knabo.

Edith Stray forpasis †

La 4an de Januaro forpasis en
Oslo fino Edith Stray. De kiam
ŝi ellernis Esperanton antaŭ proks.
37 jaroj, ŝi estis unu el la plej
fidelaj esperantistoj en nia lando.
Ĉiam tre modesta ŝi neniam estis
membro de estraroj aŭ komisionoj,
sed ŝi estis nia maldorma kons-
cienco, kiu ĉiam observis atakojn
kontraŭ, eblecojn por aŭ sukcesojn
de Esperanto, kaj atentigis nin pri
siaj observoj. Ĉiam ŝi estis preta
fari servon al la movado, kiam ŝi
tion povis fari nerimarkite; ĉiam
ŝi partoprenis kunvenojn kaj kon-
gresojn, kiam ŝia sanstato tion
permesis; efektive ŝi estis vera ĝis-
osta esperantistino. Dankante pro
ŝia vere valora agado por nia
afero dum jardekoj ni deziras pa-
con al ŝia memoro.

C. Støp-Bowitz.

Se la amo mortus

La devo unua al vi, ho vir',
la morta fin'
se ne plu ardas la amsopir'
al bel-knabin'.

Kaj tial superas ĉe ni la flam'
de ama kor'.
En viro brulas tial la am'
ĝis morta hor'.

Se tamen sen suĉi el ama mam'
ekzistus hom',
li vagus, vivus, kaj estus jam
en viv' fantom'.

(Laŭ «Når ikki lenger du
elska kann» de Aa. O. Vinje)

*

NORSK ESPERANTO-FORBUND (Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S (Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. —
Uzu tiun adreson, kiam temas pri urĝaj
sendaĵoj. — Telefono: 54 727